

Kian Eŭropan Union vi volas?

Eŭropa Unio (EU) konferencas kaj EU-civitanoj partoprenas la debaton pri kiamaniere EU evoluu. Ĉu vi havas ideojn? Ĉu vi volas aŭdebligi vian voĉon?

Ĉu vi okupiĝas pri **homaj rajtoj, egalrajteco (genra, socia, lingva, ...), medio, edukado** aŭ alia temo, kiun EU povas influi? Tiukaze partoprenu la civitanan konsulton de la EU-Konferenco kaj uzu la eblon kontribui al la debato per reta forumo starigita de EU. Apogu civitanajn proponojn, komentu ilin aŭ starigu proprajn proponojn.

Se vi (hazarde) estas unu el 267 el 450 milionoj EU-civitanoj,

kiu membras en "civitana panelo" de la EU-Konferenco, vi povus kontribui al la debato en eĉ pli grava maniero. Tamen, ne eblas postuli partoprenadon en civitana panelo, ne eblas kandidatiĝi: 800 homoj estos aleatore selektitaj inter ĉiuj 450 milionoj da eŭropuniaj civitanoj. La selektado celas speguli la civitanaron en reprezenta maniero laŭ aĝo, sekso, sociekonomia kaj edukada nivelo, loĝlando, loĝloko (urbo/kamparo) ktp.

Bona novaĵo: triono de la seĝoj en la paneloj estas rezervitaj por junaj homoj inter 16 kaj 26 jaroj! Do eble vi ricevos telefonalkolon de la Eŭropa Komisiono ĉi-somere, kiu petas vin partopreni. Nepre akceptu la inviton! Kiel panelano, vi analizos kaj pridiskutos civitanajn proponojn kaj rekomendos ilin (aŭ ne) al la konferencantoj por realigo.

Kiamaniere partopreni

Por apogi, komenti aŭ enmeti proponojn necesas registriĝi. Konciza priskribo de la registriĝa proceduro kaj pliaj informoj troviĝas en UEA-vikipaĝo <https://mallonge.net/uea-eeu>

Utilas apogi por-esperantajn proponojn

Ankaŭ lingvopolitikaj demandoj estas diskutataj en civitanaj proponoj. Ĉu EU havu komunan lingvon? Ĉu oni enkonduku Esperanton en la lernejojn? Ĉu oni agnosku Esperanton kiel eŭropan minoritatan lingvon? Tiurilataj proponoj estis starigitaj, vi trovas liston de por-esperantaj proponoj en la UEA-vikipaĝo.

Bonvolu apogi la proponon, kiun UEA/EEU taksas kiel aparte promesplenan:

- **The EU needs improved language learning**
(*Proponas grandskalan projekton kun uzo de E-o en lernejoj*)
<https://mallonge.net/propono>

Pliaj por-esperantaj proponoj estas listitaj en informilo en la UEA-vikipaĝo.

Kelkaj konsiloj

Vi ne nur povas apogi proponojn, ankaŭ eblas komenti ilin. Uzu tiun eblecon saĝe: indas atenti kelkajn konsilojn, se vi komentas por-esperantajn proponojn.

- Skribu laŭeble ne tro multajn komentojn. La membroj de la civitanaj paneloj, kiuj pritraktos, diskutos kaj decidos pri proponoj, devos okupiĝi pri centoj da proponoj. Ju pli konciza kaj trafa via komento, des pli pozitive ĝi influos la akcepton de la propono. *Krome ni rimarkis, ke ŝajne proponoj kun multnombraj, longaj komentoj suferas je **teknikaj problemoj** (supozeble ligitaj al la multlingveco kaj aŭtomata tradukado en la platformo): eĉ ne plu eblas simple voĉdoni por ili! Ni evitu tion en niaj proponoj, do eble komentu iomete malpli ofte kaj ĉiam laŭeble koncize.*
- Pripensu ke la celgrupo de niaj proponoj kaj komentoj ne estas niaj samideanoj. Ne skribu en Esperanto!
- Ne donu lingvajn aŭ historiajn lecionojn pri nia lingvo. Sufiĉas doni ligilon al bona fonto (retpaĝo) por scivolemaj ne-esperantistoj.

Registriĝo

Por apogi, komenti aŭ enmeti proponojn necesas registriĝi. Konciza priskribo troviĝas en UEA-vikipaĝo (vidu sube).

Pliaj informoj? Ĉu vie emas kunlabori en la por-esperanta kampanjo?

Pri la por-esperanta kampanjo daŭre informas [UEA-vikipaĝo](https://mallonge.net/uea-ecu) (<https://mallonge.net/uea-ecu>).

Aliĝu al la tiurilata [diskutlisto](https://groups.io/g/EU-estonteco-konferenco) (<https://groups.io/g/EU-estonteco-konferenco>), kie ni organizas la kunlaboron dum la kampanjo.